Mencioj de Emiel Willekens sr en Belga Esperantisto (selekto, entute estas 12, 1913-1934)

BE marto-aprilo 1922

— Al gesinjoroj Emiel Willekens, Antverpeno, naskiĝis fileto, Emiel, la 24an de februaro.

BE aŭgusto-septembro 1926

LA LABORISTA POPOLA UNIVERSITATO kaj LA OFICISTA SINDIKATO DE KOMERCO KAJ INDUSTRIO, en siaj programoj por la venonta vintro, anoncas la organizon de Esperanto-kurso. En la unua gvidas la kurson nia malnova samideano Em. Willekens, en la dua: S-ro Morris De Ketelaere.

BE aŭgusto 1927

Krom la kursoj, kiujn aranĝas la liga grupo «La Verda Stelo» aliaj lecionoj de Esperanto estas anoncitaj per apartaj afiŝoj:

1e en la vesperkursoj de la urbaj lernejoj; 2e en la Popola Universitato por Laboristoj (profesoro Sro E. Willekens), 3e en la Sindikato de oficistoj de komerco kaj industrio.

BE oktobro 1929

La Laborista Popol-universitato malfermis novajn Esperanto-kursojn: du elementajn gviditajn de S-roj Em. Willekens kaj Is. Van Praag, kaj unu perfektigan gviditan de S-ro Em. Willekens. Ili havas entute sesdekon da lernantoj. Tiuj kursoj estis anoncitaj en la bela prospekto, kiun tiu popola universitato eldonis pri la lernojaro 1929-30.

BE februaro 1932

*Membroj dum almenaŭ 20 jaroj*

S-ino L. BRUNIN-SCHOOFS. — Fidela membrino. (1912)

S-ro W. DE KONING. — Fidela membro. Kunlaborinto de la L.K.K. dum la Kongreso de 1928. (1912)

S-ro Jos. QUAEYHAEGE. — Fidela membro. (1912)

S-ro Em. WILLEKENS. — Fidela membro. Profesoro de Esperanto. (1912)

BE marto-aprilo 1933

BOOM. — Okazas kurso de Esperanto por la membroj de la Sindikata Junularo, Sekcio Boom, kiu akiris por tio ejon en la komunuma lernejo. La kurso estas gvidata de S-ro Emiel Willekens, el Antverpeno.